

Theodor Storm,

## Marbordo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Marborden flugas mevo  
Kaj ekkrepuskas nun;  
Super malsekaj marĉoj  
Sumas vespera sun'.

Griza birdar' kuretas  
Ĉe l' akvo en nebul',  
Kaj kuŝas kiel en songo  
Surmare la insul'.

Aŭdiĝas de l' ŝlim' fermentanta  
Sekretoplana son',  
Soleca kriado de birdoj –  
Samkiel de eon'.

Mallaŭte ekstremetas,  
Ekkuŝas nun la vent';  
La voĉoj super la marĉo  
Aŭdeblas en la silent'.

*Traduko de la Germana poemo "Meeresstrand" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983-02.*

*MR-025-2 / Arg-221-438 (2004-04-09 17:49:01)*